

Martin Rinckart,
Nun danku ni al Dio

tradukita de Clarence Bicknell

Nun danku ni al Dio
Per mano, voĉo, koro!
La tuta mondo ĝojas
Pro lia granda gloro.
De frua infaneco
Li nin beninta estas,
Kaj liaj amdonacoj
Kun ni ankoraŭ restas.

Li gvidu nin konstante
Sur tuta vivovojo,
Benante niajn korojn
Per paco kaj per ĝojo;
Li ŝirmu de danĝero,
Li donu korfavoron,
Kaj de malbono gardu
Nin nun kaj ĉiun horon.

Ho, estu niaj voĉoj
Kun danko nun levataj
Al Patro, Fil', Spirito,
Egale adorataj.
De homoj sur la tero,
Ĉielaj anĝelaroj,
Al Dio sonu laŭdo
Dum la eternaj jaroj.

*Traduko de la Germana poemo "Nun danket alle Gott" de MARTIN RINCKART (*1586-04-24 - †1649-12-08)
en Esperanton de Clarence Bicknell.*

Arg-1044-2120 (2014-06-08 10:55:18)

Pri la tradukinto vidu la retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Clarence_Bicknell.